



8-6-1974

Conselho Brasileiro de Esperanto

BRASÍLIA - DISTRITO FEDERAL

PRESIDÊNCIA

Rua Galeão Carvalhal, 31 - AP. 73

Telefone 4-8033

11.100 - Santos (SP)

SECRETARIA

Caixa Postal 07 - 1182

Telefone 42-9090

70.000 - Brasília (DF)

CGC nº

00406 5000-06

DEZEMBRO DE 1978

ÓRGÃO OFICIAL DO BKE

Nº 41

Redação: **MARIA ALMADA**

AL NOVAJ BATALANTOJ


F.S.Almada

La gloron kantu ni de la genia,
de la senmorta Majstro senegala!
Por ni, ekzemplo estu ideala,
en koroj niaj la obstino lia.

En ĉiu loko estu homo tia,
senlaca laborantó' universala,
por ke fariĝu tuj vere reala
la Zamenhofa lingv' internacia!

Klopodojn niajn ne rifuzu ni,
ni ne forgesu lin, kaj pli kaj pli
kuraĝe ni agadu tra la mondo!

Feliĉaj tiuj, kiuj povos, fine,
la tutan vivon agi ja obstine,
por ke ne ĉesu kreski nia rondo!!



ZAMENHOFA TAGO

La 15-an de decembro kuranta, la esperanta mondo festas la datrevenon de L. Zamenhof, kreinto de la lingvo internacia Esperanto.

Ĉijare la festo havas novan titolon: "Jaro de homaj rajtoj kaj Esperanto". La titolo estas trafa, ĉar Zamenhof pere de la interlingvo celis humanigi la mondon. Pere de Esperanto li intencis faciligi la komunikadon inter la popoloj.

Gesamideanoj, ni memoru nian senmortan Majstron okaze de lia naskiĝtago!

GRAVA SCIIGO

II-A JUNULARA RENKONTIĜO

BEJO informas, ke la II-a Junulara Renkontiĝo en Gojanio (GO), kiu estis planita por la monato januaro, 1979, okazos de la 14-a ĝis la 18-a de februaro 1979. La Organiza Komitato ŝanĝis la daton pro la peto de la plimulto de la gejunuloj. Krom laborkunsidoj okazos prelegoj pri muziko, lingvistiko, varbado, sportludoj kaj ekskurso al Caldas Novas. Estos ankaŭ elekto de "Fraŭlino BEJO" kaj diskonigo de la Renkontiĝa Rezolucio. Estas prizor-

gata senpaga loĝejo al ĉiuj partoprenantoj. La kotizoj: - Ĝis 30-jaraĝa Cr\$ 150,00; pli ol 30-jara Cr\$ 200,00; subtenanto-Patro no Cr\$ 300,00. Oni sendu la aliĝon al Fabricio Rodrigues Valle, Cx. Postal N^o 10.072 - CEP 74.000 - Gojania (GO), ĉu per ĉeko pagebla en Gojania, ĉu per poŝtmandato.

☆☆☆☆☆☆

ILHÉUS (BA): — Nia vicprezidanto Eleus L. de Sá informas nin, ke la revuo de li reprezentata "Semajno", tre grava magazino internacia, sendependa politike, ekonomie kaj kulture ekaperos en la venonta januaro. Informojn oni petu de li laŭ la adreso: — Calçada de Paranaguá, 109 s/101 - CEP 45.660 - Ilhéus (BA).

☆☆☆☆☆☆

REGIONA RENKONTIĜO DE ESPERANTISTOJ

La 26-an de novembro pasinta, realiĝis la III-a Renkontiĝo de Esperantistoj en la urbo São Carlos (SP), kiun organizis la San-Paŭlo Esperanto-Asocio kune kun grupo de gesamideanoj el São Carlos.

La evento okazis en la lernejo "SE-NAC" kun ĉeesto de ĉirkaŭ 200 personoj el diversaj urboj.

Prof-ro Paulo Domingos Mieres Caruso malfermis la laborkunsidon. Partoprenis ĝin prof-ino Elvira Fontes, prez. de San-Paŭlo Esperanto Asocio; prof-ro F. S. Almada, prez. de Brazilia Konsilantaro de Esperanto; prof-ro Wilson Ferreira Martins; Majoro Gilberto A. Silva Velho, vicprezj. de BKE; prof-ro Euclides G. Carvalho, prez. de la Esperanto-Societo de Bauru, prof-ro Sylla M. Chaves, prez. de Brazilia Esperanto-Ligo; prof-ro Eluísio Bueno Rodrigues, prez. de Sorokaba Esperanto-Klubo. Prof-ro F. S. Almada estis invitita prezidi la labortablon, kion li faris malfermante la laborojn per salutvortoj al ĉeestantaro, dezirante sukceson en tiu renkontiĝo, post kio oni kantis la nacian himnon.

La prezidanto kunvokis paroladi la reprezentantojn de la urboj, kiuj partoprenis la renkontiĝon: unue parolis la reprezentanto de Araçatuba (SP) - Sam-no José Luiz Ribeiro, kiu inter aliaj informis pri la progreso de Esperanto en sia urbo kaj ke baldaŭ 12 gelnantoj finos la kur-

son. Parolis poste la reprezentanto de Bauru, prof-ro Euclides G. de Carvalho, kiu informis pri grava fakto okazinta en la urbo: nome, estis enkondukita oficiala kurso de Esperanto en la Fakultaton Katolikan, kies direktorino, la monaĥino Wilma R. de Lima diligente lernas la internacian lingvon. La anaro de la societo nombras 69 elementojn, kaj nuntempe oni klopodas organizi plurajn kampanojn por akiri monon cele aĉeti novan sidejon. La lokaj gazetoj aperigas artikolojn pri la internacia lingvo.

La reprezentanto de la urbo Promissão, Lair Alves Moreira estis la sekvanta parolanto. Li informis, ke tie ekzistas grupo nombrante 38 geesperantistojn. Funkcias ankaŭ futbalo de salono por infanoj kaj la gazetoj aperigas artikolojn pri la internacia lingvo. La movado tie vigligas plie.

El Rio Claro (SP), parolis poste samno Ademir Nascimento Alves, kiu informis, ke li gvidas kurson por 20 gelnantoj en tiu progresema urbo.

Sekvis la parolado de sam-no D-ro La-corday Andrade informante, ke en "Nosso Lar" funkcias kurso por spiritisma junularo, kiun partoprenas ĉirkaŭ 100 gelnantoj, ke la "Radio Guarulhos" ofte diskonigas la Internacian Lingvon. Li laboras en grupoj, al kiuj li klarigas, instruas kaj propagandas pri Esperanto.

Sam-ro Prof-ro Wilson F. Martins parolas nun, farante prelegon pri la Internacia Scienca Simpozio, pri kio li laboradas nuntempe, ĉar ĝi estas programita por la venonta aprilo, en Marilja (SP), ĉe "Associação Paulista de Medicina" sur "Avenida Pedro de Toledo, 179". - Li informas, ke jam aliĝis interesuloj el Germanio, Kimrujo, Belgio, Norvegujo, Argentino, Japanujo, Urugvajo kaj Brazilo. La reprezentanto de Sorokaba, Manoel Blaz Garcia, ankaŭ nia vicprezidanto, salutis la ĉeestantaron kaj sciigis, ke la klubo en tiu urbo havas 95 anojn, ke oni prizorgas nuntempe disvendi hipotezajn brikojn por havigi sidejon; ĉiu briko kostas po Cr\$ 200,00. La "Radio Sorokaba" daŭre disvastigas Esperanton, laŭ programo de li farita. La ĉiam diligenta prezidanto de la klubo, sam-ro Eluísio Bueno Rodrigues dissendas monate informan bultenon.

Fino Eliana Lucia Corrêa parolis en la nomo de BEJO, kaj invitis la esperantistaron partopreni la duan renkontiĝon de

la junularo, en la venonta januaro, en la urbo Gojania (GO).

Sekvis la parolado de nia vicprezidanto D-ro Walter A. Francini, kiu pritraktis la internaciajn kongresojn de Esperanto, brile kaj ĉiam entuziasme.

Prof-ro Ivon Barbosa, nun nia vicprezidanto, prelegis pri la delegitaro de UEA en Brazilo kaj en la mondo, espriminte deziron plialtigi ĝian nombron en nia lando.

Daŭrigante la laborojn oni elektis la novan estraron de la ĵus fondita San Karlo Esperanto - Klubo, kio okazis per aplaŭdoj al ĉiu elemento: Prezidanto: - Prof-ro Paulo Domingos Caruso; Sekretario - Enio Ramos; Kasisto - Romildo Vetturi kaj Bibliotekisto - F-ino Denise Torresan. Konsilantaro: - Reginaldo Cano, Eugênio Steffani kaj Denise Rodrigues.

La mandato de tiu estraro estos de 1978 ĝis 31-X-1979.

Estis disdonitaj diplomoj al la kursfinintoj de São Carlos, post kio parolis samnomo Eufrazio Moreira en la nomo de la novbakita klubo, elstariginte la pioniran laboron de Prof-ro Walter Francini, kiu enplantis Esperanton en São Carlos, kaj pri la laboro de Prof-ro Paulo Domingos Caruso, kiu daŭrigas tiun aktivecon, post lia translokiĝo al São Carlos, kie li tuj organizis la movadon kaj ekinstruis la internacian lingvon. En la nomo de la diplomitoj parolis Enio Ramos, kiu elstarigis la gravecon de la nov-organizita Esperanto-Klubo. Ni deziras prosperon kaj longan vivon al la nova organizaĵo kaj sukceson al niaj diligentaj gesamideanoj el São Carlos.

INTERNACIA JARO DE LA INFANOJ

Estas amplekse diskonigite, ke la jaro 1979-a estis dediĉita al futuraj plenkreskuloj, al niaj hodiaŭaj infanoj.

Ni estis pripensantaj pere de kiu artikolo ni komencu menci tiun gravan eventon, kiam iu eta kunlaboranto neatendite helpis nin.

Temas pri André Luís Caruso, 5-jaraĝa poeto, filo de nia vicprezidanto Paulo Domingos Caruso. André Luís diktis portugallingve poeziaĵon, kiun tradukis Sam-ino Fanny Dupré.

Nenio estas tiel taŭga por malfermi la Internacian Jaron de La Infanoj ol lia poeziaĵo:

Numa manhã de julho
um raio de sol faz brilhar
gotinhas de orvalho
numa rosa.

Traduko:

En julia mateno
sunradio faras brili
gutetojn de roso
sur unu rozo.

André Luís naskiĝis en Pelotas (RS), sed nuntempe li loĝas en São Carlos. Li estas certe futura esperantisto.

Tre ŝata de siaj parencoj, li estas feliĉa infano, kiu havas gepatrojn, kiuj lin amas.

En la Internacia Jaro de la Infanoj ni ne forgesu tiujn etulojn, kiuj ne havas gepatrojn; neniu ilin karesas; ili neniam konis siajn gepatrojn. La Internacia Jaro estas ankaŭ ilia, kaj ili esperas kaj deziras komprenemon, helpon kaj pli belan futuron. Ili revas esti egalaj al André Luís.

Nun alproksimiĝas la Kristnasko kaj ni memoru pri tiuj infanoj al kiuj neniu donos ludilojn, nek sukeraĵojn, nek kareson.

Karaj geamikoj, niaj gesamideanoj, la geedzoj Grattapaglia, prizorgas orfojn en la bieno Bona Espero, kiuj meritas ĉies helpon.

La poemon de André Luís transdonis al ni sam-ino Fanny Dupré, poetino, kiu gajnis premion kun siaj hajkoj. Al nia ĉiam helpema sam-ino ni kore dankas la kunlaboraĵon.

4 8 4 8 4 8 4

ESPERANTO ELEMENTAR

Daŭras senĉese la disvendado de la libro de nia prezidanto "Esperanto Elementar", ne nur de nia redaktejo sed de la librovendejoj de Brazilia Esperanto Asocio (adreso: - Cx. Postal N° 04-0577 - 70.000 - Brasília (DF); de San-Paŭlo Esperanto-Asocio (adr.: Cx. Postal N° 5888 - 01.000 São Paulo (SP); de Liga Uberabense de Esperanto (adr.: Cx. Postal N° 110 - 38.100 - Uberaba (MG); de Livraria Pingo de Luz, (adr.: R. Mal. Deodoro, 11 - 11.100 - Santos (SP); de Cooperativa Cultural dos Esperantistas - Cx. Postal 1887 - ZC 00 - 20.000 Rio de Janeiro. Aliaj libroj tre interesaj al esperantistaro estas troveblaj en tiuj librovendejoj.

KRISTNASKOFESTOJ

Karaj gesamideanoj, gefratoj, helpantoj, geamikoj!

Denove alvenis la jarfino. Analizante la pasintan jaron ni konkludas, ke ni ĉiuj agadis pli aktive ol en la antaŭa jaro, tamen ne sufiĉe, ĉar estis ankoraŭ multe da laboro farenda.

Ni estas konvinkitaj, ke en la venonta jaro ni ĉiuj denove kune agados kaj ĉiam pli bone. Neniu el niaj gesamideanoj estis neaktiva. Ĉiu persono kunlaboris laŭeble pli bone. Kelkaj pli, aliaj malpli, sed ĉiuj bone agadis.

Bedaŭrinde nia bulteno estas eta, mankas al ni spaco kaj pro tio ne estas eble aperigi ĉies nomojn kiel ni tion planis. La nombro de bonegaj geesperantistoj estas granda! Ni ne dezirus forgesi eĉ unu el ili, do ni dankas ĉies kunlaboradon, amike kaj frate kaj al ĉiuj senescepte ni el tuta koro deziras feliĉan Kristnaskon kaj tre prosperan Novjaron.

Nur en februaro de 1979 ni aperigos nian venontan bultenon. Ĝis tiam!

GRAVA EKSPOZICIO

Nia senlaca kunlaboranto Majoro Gilberto A. Silva Velho, ankoraŭfoje preparis eksterordinaran ekspozicion pri esperantaĵoj en la enirsalono de "SENAC" kiu allogis la multnombrian vizitantaron. Bele organizita, sur afiŝoj kaprice preparitaj, lia ekspozicio fakte vokis la atenton de multaj neesperantistoj, entuziasmigante ilin al lernado de la internacia lingvo.

☆☆☆☆☆☆

LINGVA PRIKOMENTO

D.W. Argentino

"Li estis en Parizo, kiam lia edzino mortis" - Prefere: ... "kiam mortis lia edzino". - Inter la du formoj estas delikata diferenco. Estas afero de stilo. "Grupo de homoj, kiuj devas plenumi iun taskon" - En tiu ĉi frazo la prepozicio "de" estas tute ĝusta. La prepozicio "da" ni uzas nur tiam, kiam ni parolas pri nombro aŭ kvanto, kaj kiam la konforma demando vorto estas "kiom"? "Ĉu vi ne min aŭdas?" - En tiu ĉi frazo la ordo de la vortoj ne estas bona, ĉar la vorto "ne" estas en malĝusta loko. Ĝi devas esti ĉi tie antaŭ la verbo. Do, "Ĉu vi min ne aŭdas?" "La afero finis". La verbo "fini" estas transitiva. Tial

"la afero finiĝis, ĉar la homoj finis ĝin". "Li eĉ ne jam estas trovita". Malbona frazo, korekte: "Li eĉ ne estas trovita ankoraŭ". "Ne min tuŝas" - La vorto "ne" devas esti antaŭ la neata vorto. La vorto "ne" apartenas al la verbo, Tial ni diru: "Ne tuŝas min". La citita frazo ne estas malkorekta, sed ĝi havas alian signifon: ne min, sed alian personon tuŝas. "La knabino eliris la preĝejon". Ĉi tie la frazo devas tiel finiĝi: "eliris el la preĝejo". Ĉe la verbo "eliri" la preĝejo ne estas la direkto de la iro, do ĝi ne povas ricevi la finaĵon "n" de la direkto.

☆☆☆☆☆☆

MONO RICEVITA

Por la aperigo de nia bulterno, bonkoruloj nin helpas per la jenaj sumoj:

Lauro J. de Oliveira	Cr\$ 120,00
Evandro M.A. Braga	100,00
Seraphim Guedes	100,00
Claudio Zimmermann	100,00
F. S. Almada por presigi propagandilojn	2.000,00
Tezo vendita	100,00
Hersila Valverde	100,00

SOMERO

Maria Almada

Sur ĉielo ardas la sun',
Amrevo brulas en la koroj.
Okulumas kaŝe la lun'
En amoplenaj noktaj horoj...

☆☆☆☆☆☆

GRAVA KOMUNIKO

Laŭ la Cirkulero n° 4/78 de la Ĉefdelegito de UEA, S-ro Giuseppe Grattapaglia, vicprezidanto de nia BKE, tiuj, kiuj deziras membriĝi al la Universala Esperanto-Asocio povas tion fari pere de li, sendante la kotizon rekte al li, ĉu per ĉeko pagebla en Brazilio, ĉu per poŝtmandato laŭ la jena adreso: Caixa Postal n° 04-0097 - CEP 70.000 - Brasília (DF). La kotizoj por la jaro 1979:

Individua membro kun jarlibro	Cr\$ 160,00
Ind. Membro Abonanto kun jarlibro kaj la revuo "Esperanto"	Cr\$ 400,00

(Ĝis inkluzive 25 jaroj ricevas senpage "Kontakton").
Simpla abono de "Esperanto" (sen mem-

breco) Cr\$ 240,00
 Abono de "Kontakto" sen membreco de
 TEJO Cr\$ 120,00
 Aldona pago por Societo Zamenhof
 Cr\$ 800,00

Por tiuj, kiuj deziras fariĝi Dumviva
 Membro de UEA, kaj neniam plu suferi
 pro ĉiujaraj plialtiĝoj de kotizoj, ekzistas
 unu sola ebleco: ĝis la 31-a de decembro
 validas ankoraŭ la malnova kotizo de Cr\$
 5.625,00. Poste . . . Cr\$ 10.000,00.

☆☆☆☆☆☆

NOVA VICPREZIDANTO — Invitita de
 nia prezidanto por partopreni la reton de
 niaj vicprezidantoj, sam-no Ivon Barbosa
 konsentis kaj elektis la fakon INSTRUA-
 DO KAJ DISVASTIGADO DE ESPE-
 RANTO. Li estas la 66-a elemento de tiu
 reto, kaj ni esperas, ke li estu unu el la plej
 bonaj kunlaborantoj de BKE. Ni dankas
 lian aprobon.

☆☆☆☆☆☆

LAIR ALVES MOREIRA

Sam-no Moreira lernis Esperanton an-
 taŭ 5 jaroj en Promissão (SP), kie li anko-
 raŭ loĝas. Lernanto de nia vicprezidanto
 Wilson Ferreira Martins, li tre rapide lernis
 la lingvon, ĉar li ŝatas fremdajn lingvojn.
 Kun efika laboro li organizis grupon en
 Promissão kun ĉirkaŭ 20 elementoj. Li
 senĉese varbas novajn anojn kaj samtempe
 instruas la interlingvon en tiu urbo. Li hel-
 pis al sam-no Martins en la organizado de
 la Latinamerika Kongreso, kiam li tre ak-
 tive kunlaboris senlace, kio multe efikis
 por la sukceso de la evento.

La idealo de Zamenhof allogis lin kaj
 nia movado gajnis novan kaj tre valoran
 batalanton.

En la loka gazeto "Comarca de Pro-
 missão" aperis artikoloj liaj pri Esperanto,
 informante, ke la urbestro D-ro Ivo Ferrei-
 ra Gama nomis "Esperanto" iun straton
 kaj la antaŭa urbestro jam estis nominta
 "Zamenhof" alian straton. Li informas
 nun, ke en la apuda urbo Lins la Espe-
 ranto-Movado bone marŝas dank'al la kon-
 greso okazinta en Marilja. Ni deziras daŭ-
 ran sukceson al nia diligenta sam-no Lair
 Alves Moreira.

SCHIGOJ . . .

Araçatuba (SP) — Nia samideano Jo-
 sé Luís Ribeiro transdonis al ni interesajn
 novaĵojn pri tiu pitoreska urbo. Li anoncis,
 ke en Araçatuba en la nuna monato oni
 organizas kurson, kiu ricevis 14 interesa-
 tojn. La societo ankoraŭ ne havas sufiĉe
 grandan nombron da anoj, sed ĝi kreskas.

Sam-no Ribeiro planas por la jaro
 1979-a aranĝi regionan renkontiĝon por
 interfratiĝo de la esperantistaro. Certe la
 klubanoj prizorgos senpagan loĝejon al la
 ĉeestontoj. Ni deziras, ke ĉio bone realiĝu.
 Bonan sorton al la Arasatubanoj!

Barra do Garças (MT) — Sam-no Ribeiro
 alportis novaĵon ankaŭ el Barra do Gar-
 ças, kie la 1-an de novembro en Hotelo
 San-Paŭlo okazis renkontiĝo kaj estis inaŭ-
 gurita Esperanto-kurso.

La instruadon daŭrigas nia bone ko-
 nata sam-no Ciro Gomes de Freitas, kiu
 antaŭ kelkaj jaroj propagandis pri Espe-
 ranto en tiu urbo, kie ĝis nun ne ekzistis
 esperantistoj.

Ciro G. Freitas estas prezidanto de
 BEJO.

Ni gratulas al nia altestimata sam-no
 José Luís Ribeiro, kiu "semas kaj semas",
 disvastigante la internacian lingvon inter
 la junulojn. Ni dankas la valorajn sciigojn.

El Barra do Garças (MT) — C.E.P.
 78.300 deziras korespondi: Genilson Mi-
 rage Icets - A/C do Banco Itaú; Maria de
 Jesus Gomes dos Santos - Prefeitura Mu-
 nicipal; Gracilma Maria Fernandes Araújo
 - Câmara Municipal; Renilde Goulart - Câ-
 mara Municipal; Ana Maria Francisca - Câ-
 mara Municipal; Luís Carlos Ferreira -
 Rua Carajás, 104; kaj Osmar Gonçalves -
 Av. Ministrio João Alberto, 75.

Indaítuba (SP) — Nia estimata sam-
 -no kaj senlaca kunlaboranto Seraphim
 Guedes alvenis al Santos kunportinte bo-
 negan novaĵon pri la Prof-ro Wanderley
 Peres, nia vicprezidanto, kiu propagandas
 lastatempe pri Esperanto pere de la "Ra-
 dio Convenção" de Itú (SP). Li disaŭdigas
 sian programon de la 19-a ĝis la 19-a kaj
 30 minutoj ĉiu sabate. Ni dankas pri la in-
 formo kaj gratulas nian karan sam-non
 Wanderley Peres.

Fortaleza (CE) — Nia kara vicprezi-
 danto Prof-ro Paulo Amorim Cardoso sen-
 dis al ni sian libron "Esperanto - Língua

Viva" - speciala metodo por instrui la lingvon per korespondado. Ni trovas ĝin tre interesa kaj ĝin rekomendas al tiuj, kiuj ne povas havi instruiston en sia urbo. La adreso de Prof-ro Amorim: Caixa Postal no 1221 - Fortaleza (CE) - CEP 60.000.

☆☆☆☆☆☆

TEZO PRI ESPERANTO

Nia kara sam-no Prof-ro José Passini, de la Federacia Universitato de Juiz de Fora (MG), donacis al BKE por helpi la eldonadon de la Informa Bulteno, kelkajn ekzemplerojn de sia tezo pri Esperanto-instruado, kiujn ni disvendis je Cr\$ 100,00.

La interesatoj sin turnu al nia redak-tejo: - Rua Galeão Carvalhal, 31 apto. 73 CEP 11.100 - Santos (SP).

☆☆☆☆☆☆

NID DUTRA D'AMORIM

Inĝeniero pri pavimado de ŝosejoj kaj teraplanaĵo. Naskiĝis en la fama ŝtato Bahia. En 1947 li eklernis Esperanton tut-sola, kiel memlernanto, helpata kelkafoje de sam-no Hermes de Deus Pitta. La Zamenhofa idealo allogis la tiam juna Amorim, kiu nentempe scipovas la internacian lingvon perfekte.

En 1952 li kune kun grupo de gesamideanoj fondis Esperanto-Klubon en Macaí (AL) kie li kune kun sam-no Paulino Santiago starigis elementan kurson en la novfondita Klubo. Ek de 1952-a li estas delegito de UEA. Instruante Esperanton li konatiĝis kun sia ĉarma edzino, s-ino Maria Izabel, kiu senprokraste lin allogis kaj poste ili geedziĝis en 1953-a dank'al Esperanto.

Sam-no Amorim iĝis radiamatoro, hobia kiun li praktikas en interlingvo. Pere de radio li kontaktas multajn esperantistojn tra la mondo. Ekz. en Israelo, Meksiko, Havajo, Usono, Francujo, Belgio, Danlando, ktp. Nuntempe li sukcesas kontakti kun brazilaj ŝtatoj utiligante la prefikson PY 6 JZ (Jaro Zamenhofa).

Li estas valora kunlaboranto en nia ĉefurbo, kie li nentempe loĝas, helpante la Esperanto-Movadon. Dank'al lia klopodo, en la jaro 1976-a la XI-a Seminario de Esperanto brile sukcesis en Brazilio. Li

aranĝis senpagan transportilojn por ĉiuj personoj, senpagan manĝaĵon kaj loĝejojn. Li estis la prezidanto de la evento. Lia edzino, s-ino Maria Izabel, afable akceptis grupon de geesperantistoj en sia hejmo, kie la etoso estis frata kaj vere esperanta.

Okaze de la Latinamerika Kongreso sam-no Amorim reprezentis la guberniestron de la Federacia Distrikto kaj estis elektita per varmaj aplaŭdoj, prezidanto de la unua Universala Kongreso de Esperanto, planita por la jaro 1981-a.

Nuntempe li fortostreĉe klopodas aranĝi propran sidejon por la Brazilia Esperanto-Asocio kaj Brazila Konsilantaro de Esperanto, kies vicprezidanto li estas.

Unu el la plej aktivaj kaj klopodemaj samideanoj de Brazilo, li ĉiam laboradas kun granda entuziasmo por la movado.

Ni kore dankas al sam-no Nid Dutra D'Amorim la helpon kaj deziras al li senhaltan sukceson en sia efika laboro.

☆☆☆☆☆☆

GAZETOJ RICEVITAJ

Afable oni sendis al ni la jenajn gazetojn, kies enhavoj pritraktas nian movadon, diskonigante gravajn informojn pri Esperanto:

"O NO-SSO, "Conhecimento", "Folha Espírita", "Nove de Abril" - de Volta Redonda, Bahia Esperantisto, de Salvador, SEK - de Sorokaba, "Boletim" de São Paulo, "Esperanto Notícias, de Rio de Janeiro, "Folha de Caçapava", "Diário de Taubaté", "Correio Fraternal do A.B.C.", "Comarca de Promissão", "Nova Era" - de Franca, "Boletim Informativo Cerqueira", de Santos e "Cidade de Santos". Dankon al ĉiuj!

Salvador (BA) - La Bahia Esperanto-Asocio bone aktivis kiel ĉiam. Pluraj Esperanto-kursoj funkcias en tiu fama ŝtato kaj en la ĉefurbo Salvador.

La unua numero de "Bahia Esperantisto" elmontras laŭdindan progreson. Ni deziras longan vivon al ĉiuj gesamideanoj kaj sukceson al ilia movado.

Por la senditaj "Bondeziroj" pri Kristnasko ni reciproke dankas.